

Protokolo de estrara interkonsiliĝo la 10-an de novembro 2016 je la 19.30

Partoprenantoj: Mario Machlik, Anne Karin Bondhus, Amelie Matt, Herman Ranes, Hilde Dahlberg, Ulf Lunde (ekde punkto 5.)

0. Tagordo

Aprobata

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 13-an de oktobro

Aprobata

2. Ekonomio

Skagen Vekst 49 805 kr (49 332 kr)

Skagen Høyrente 129 977 kr (129 828 kr)

3. Landa kunveno 2017

En la venonta numero de Norvega Esperantisto ni prezentu la ejon (Sandnes) kaj la datojn (9/6 - 11/6) de la landa kongreso. Anne Karin parolos kun Ingebjørg Rambjør pri alternativoj por ekskurso kaj por rezervi ĉambrojn en la hotelo.

4. Seminario

La seminario okazos la 19-an de novembro de la 14a horo. Lu Wunsch Rolshoven estos la ĉefpreleganto pri informado, sed ni havos diversajn aliajn temojn, kunlaboro en Skandinavio, ekzamena sistemo en Norvegio, propono pri nova laborplano, Landa Kunveno 2017, kaj novaspekta hejmpaĝo. Mario sendos memorigon pri la seminario al Nel-inform komence de la venonta semajno.

5. Nova aspekto de esperanto.no (vidu retmesaĝon de Judith la 24/10)

La estraro estas tre kontenta pri la moderna aspekto de nia renovigita hejmpaĝo, kaj pri tio, ke ĝi nun bone legeblas en ĉiuj legiloj. Ni povus solvi la demandon pri freŝaj novaĵoj transprenante novaĵojn de Esperanto-Nytt. Dum la seminario ni povus plu diskuti la temon.

6. Nepagintoj (vidu retmesaĝon de Anne Karin la 18/10)

Ni devus sendi memorigan leteron al tiuj, kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon por 2016. (temas pri 15 membroj) Ni prefere sendu tiun fine de novembro aŭ komence de decembro. Tio povus esti retmesaĝo, aŭ letero sendita kun la membrogazeto aŭ aparte.

7. Eventualaĵoj

A, Ni riskas pagi domimposton pro Esperantonia, Herman parolos kun Douglas pri kiel ni povus eviti tion.

B, Ĉe <http://www.esperanto.no/rorsla/bibliotek/> nun aperis listo de libroj, kiujn la oficejo volas fordoni. Douglas demandas ĉu ni vendu ilin aŭ ni fordonu ilin kontraŭ la sendokostoj. Ni proponas, ke ni vendu la librojn al membroj kontraŭ simbola prezo de 20 kronoj.

Venonta interkonsiliĝo: la 8-an de decembro

La kunveno daŭris ĝis la 21.30.

Protokolis: Mario Machlik